

LA LAMPIRO

62-a jaro, numero 169, 2021: 3



Kiun vakcini la unua?



#1

KION

VI

ŜERCAS?

Vidu nian kanalon!

youtube.com/user/Vivagazeto



#07

Lingva
Provoko

LA LAMPIRO

62-a jaro, numero 169, 2021: 3

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório



La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj.

Foto de la Kovrilo el Getty Images®

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183
easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2020

Simpla membro.....R\$ 150,00.
Subtena membro.....R\$ 300,00.
Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Dejoroj:

Sabate: 9h - 12h
Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Alencar Lima

Vicprezidanto: Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretario: José Roberto Tenório

2-a Sekretario: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: Conceição Rodrigues

2-a Kasisto: Maria Delza Macabu

Direktoro pri propagando: vaka

Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj
José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

Enhavo

Vortoj de la prezidanto	5
Vortoj de la redaktanto	6
Kiun vakcini la unua?.....	7
Prologo de Pektusan - La epopeo de Cho Ki-chon	8
Pureco - virto de anto, ne de ato	11
Se mi povus... ..	13
Grava novaĵo en la agado de EASP: Legoklubo Gilbert Ledon	14
Instituto Butantan: pli ol vakcina produktejo	15
La rakonto pri iu fonto	17
La rotaria klubo invitas.....	18
Ĉu defio por la legantaro?	19
Lingvaj Respondoj	22
Mikrorakontoj: nova literatura ĝenro?	25
"La Eta Leono Lernas Aliajn Blekojn".....	26
RADIOAKTIVA	27



Vortoj de la prezidanto

Al ĉiuj geamikoj kaj samideanoj, kiuj havas la saman idealon, mi deziras sanon en ĉi tiu momento de nia vivo. Al ĉiuj mi deziras bonan vakciniĝon kontraŭ la danĝera kronviruso.

Ni travivas malfacilan momenton, dum kiu estas necesaj prudento kaj singardemo. En Brazilo, estas taŭga popola diraĵo: “Milda buljono kaj singardemo al neniu malbonfaras.”

Ni devas respekti aliulajn pensojn, ĉar ni ne konas ĉiujn profesiojn, sed “ĉiu homo havas en si iom da medicinisto kaj iom da frenezulo”. Ni aŭskultu profesiulojn, ni ne parolu pri io, kion ni ne scias. Paroli pri io sen scio estas nura spekulado. Ni lasu fakajn aferojn al la fakuloj. Kiu parolas senceie povas misinformi kaj kaŭzi malpacon.

Ni eldiru tion, kion ni pensas, sed ni bone pensu, antaŭ ol paroli.

Agado estas servo, do ni zorgu pri niaj agoj.



Vortoj de la redaktanto

Karaj legantoj, en ĉi tiu numero de nia revuo vi povas trovi tre interesajn tekstojn. Denove nin honoras la ĉesto de Elena Popova, el Bulgarujo, kiu afable disponigas al ni siajn belajn rakontojn. Pri vakcinoj dum pandemio premieras en niaj paĝoj la estimata samideano Célio F. Martins, kiu alportas pensigajn konsiderojn pri nia terura sanitara situacio. Nia plej regula kontribuanto, la “mojosa” Anna Lobo, prezentas unu plian interesan filmon kaj nia “zamenhofido” Francisco Wechsler unu plian kompetentan lingvan respondon. Dankon ankaŭ al Aleksandro Prado (pri Instituto Butantan), João Otávio V. Rodrigues (pri Rotaria agado), Paulo Nascentes (kompreneble, pri poezio), kaj José Mauro Progiante (pri filozofio). Apartan atenton mi petas pri la teksto tradukita de Ricardo Potozky de Oliveira: ni troviĝas antaŭ junulo, kiu sin montras eminenta uzanto de nia lingvo! Pliajn kontribuojn al nia Lampiro ni esperas ricevi de vi, kara Ricardo!

En ĉi tiu numero mi decidis aparte mencii ĉiujn kontribuintojn por esprimi al ili mian elkoran dankon. Sen via partopreno, nia revuo ŝrumpus. Ĉi tiu danko funkciu same kiel invito al ĉiuj samideanoj, kiuj same povas verki por ni. Ne hezitu, karaj!

PAULO SÉRGIO VIANA

Kiun vakcini la unua?

CÉLIO FREITAS MARTINS

Post longa batalado kaj multege da anksio, finfine oni sukcesis eltrovi vakcinojn kontraŭ la terura kronviruso.

La unua problemo kiu estiĝas estas: kiun vakcini la unua?

Oni pridiskutas: ĉu la maljunulojn, ĉu la sanprofesiojn, ĉu la bebojn, ĉu la gravedulinojn, ĉu la policistojn, ĉu la politikistojn, ĉu la riĉulojn, ĉu la infanojn, ĉu la instruistojn, ĉu la stratloĝantojn kaj almozulojn?

Tiu pridiskutado estas perfekte normala, ĉar, evidente, ne ĉiuj povas esti vakcinitaj samtempe...

La grandega plejmulto ŝajnas perdita en tiu tempesto, kaj prenas kiel kompason la timegon de la morto. Ilia vivprogramo estas eviti la morton, sed... ĝis kiam? La morto estas la nura certeco de la vivo. Ĉu oni ne devus filozofie pluesplori tiun temon? Kaj samtempe analizi la celojn de la vivo? Ĉu via vivo havas alian celon krom manĝi kaj distriĝi? Kion diri pri la moralaj valoroj kaj pri la ebleco de vivo trans la tombo? Ili eĉ neniel pensas helpi siajn proksimulojn, ili volas helpi nur siajn familianojn kaj amikojn, sed proksimuloj estas ĉiuj homoj senescepte, en ĉiaj partoj de la mondo kaj el ĉiaj sociaj klasoj... Ni ĉiuj estas fratoj, vole aŭ ne. Ni ĉiuj

devas helpi unu la alian, pro la bono de ĉiuj. Tiel determinas la naturo kaj esenco de la vivo mem. Religiuloj aŭ ne, ateistoj aŭ ne, krimuloj aŭ bonfarantoj, riĉuloj aŭ almozuloj, ni ĉiuj estas fratoj. Nepras, ke la homoj kaptu kaj encerbigu ĉi tiun mesaĝon de la pandemio. Oni helpu unu la alian senescepte kaj sendiskriminacie!

Dankemo neniom tuŝas la koron de la plejmulto. Se vi ricevas vakcinon, danku la sciencistojn, kiuj eltrovis ĝin post tiom da lacegigaj laboroj dum sinsekvaj jaroj da scienca esplorado. Neniu dankas al la tombistoj, eĉ ne mencias ties ekziston!

Oni devus vakcini la unua, miaopinie, la sciencistojn eltrovintajn la vakcinojn. Poste, la tombistojn, ĉar ni bezonas iliajn higienajn servojn, temas pri publika sano kaj danko al tiuj kiuj plej multe laboras lastatempe... Ke ili kaj iliaj familianoj kaj amatoj havu sanon kaj medicinan protekton. Trie, oni vakcinu la profesiulojn kiuj injektas en nin la vakcinon. Oni almenaŭ memoru, ke tiuj Sciencistoj ekzistas, kaj ke Tombistoj ankaŭ ekzistas!

Oni estu dankaj al tiuj kiuj helpas nin! ■

Prologo de Pektusan – La epopeo de Cho Ki-chon

Traduko al Esperanto de Ricardo Potozky de Oliveira, surbaze de la angla versio eldonita de Fremdlingvaj Eldonejo de Korea. Demokratia Popola Respubliko, Pjongjango, 1990.

Originala teksto el 1947, verkita de la nacia poeto Cho Ki-chon (1913-1951). Geamikoj kaj gefratoj! Tridek milionoj!

Hodiaŭ aŭdata devas esti mia voĉo!

Ke la ondoj de la Ĉiela Lago

Leviĝantaj kiel senbridaj blankaj tigroj

Ĝis la nuboj de la ĉielo

Per siaj malvarmaj inundaj akvoj mian koron plenigu.

Ĝin la velkaj eksplodoj bruligas,

Kiuj en pasintaj tempoj furiozis

En Koreio, ĉi tiu lando mia.

Mian fidindan penikon mi prenas en manon,

Poeto neprovita kaj nekonata:

En tagoj de libereco estas mia armilo ĉi tio,

La bajoneto, per kiu mi puŝas.

Hodiaŭ aŭdata devas esti mia voĉo!

La ŝtonaj klifoj en la ĉielon suprenŝovis,

Krute kaj timige, suprendirektite

Siajn nudajn pintojn nedireble altajn,

Multe preter la nebulojn de mateno.

Sed la ŝipon de memoro ni lanĉos

Kontraŭ la rapidanta tajdo de tempo

Reen, reen al tiuj teruraj jaroj

Kiam la militistoj de nia nacio

Tiun krutan kaj timigan grimpadon faris,

Kaj sur tiuj altaj pintoj ekbruligis

1. Pektusan aŭ Monto Pektu situas ĉe la limo de Koreio kaj Ĉinio, kaj ĝi estas la plej alta monto en la montaro Changbai. Laŭ la legendoj, ĝi estas la naskiĝloko de la korea popolo – ĝi estus la ejo, al kiu la Ĉiela Reganto sendis sian filon, kiu generis Dangun Wanggeom, la unuan korean reĝon. Ĝi ankaŭ laŭdire estas la naskiĝloko de Kim Jong-il.

La signon de nia liberigo.
Tiuĵ, kiuj kontraŭ Japanio batalis,
Al Koreio ĝian liberecon redonis,
Ili pasis trans la larĝan riveron Tumen,
Trans la pintojn de Changbai ili pasis,
Kie en ĉiu monta valo
Kuŝis la signoj de lastatempa batalo.
Kaj nun mi – libera Koreo,
Tute libere al la pinto supreniras.
Mia patrujo montriĝas al mi
De alteco de tri mil ri.
Ho praa praula lando!
Ho vivsango de mia popolo
Dum pli ol kvindek jarcentoj kuranta
Tra la vejnoj de nia patrujo!
Ni memoras, kiel vi priverŝita estis
Per la tranĉiloj de la japano.
Milojn da militistoj ni revokas
Dormantajn sur la falintaj folioj,
En la mallumo de Pektu-arbaro,
Enirantajn la Teron de Morto
Kvazaŭ tra la pordo de ilia patra domo.
Parolu, grizkapa Pektu!
Kiu en ĉi tiu libera lando estas
La ĉampiono de la homoj,
En la batalo ilia generalo estas kiu?
Staras tigro sur la monto,
Kiel statuo, trankvila kaj senmova
La Pektu-tigro de la legendo,
Kun unu etendita potenca piedo,
Rigardante suden laŭ la monteto.
Pro lia timinda rorado tremas la gorĝo,
Al la malamiko venĝon minacanta.

Per unu salto, rapida kiel la vento,
En la nebulon li malaperis,
Kaj lasis la venton sola kaj ĝemanta
Por inter la klifoj turnmoviĝi kaj ludi.
Reakirinte mian konsternitan rezonadon,
Mi aŭskultas la fajfantan venton,
Kaj ankoraŭfoje ŝajnas al mi, ke mi aŭdas
La eĥon de tiu terura roro.
Ĉi tie mi staras alte sur la klifo.
Eble ĉi tiu estas la sama loko
Kie niaj partizanoj niajn malamikojn dispremis,
Kaj plenumis siajn kolerajn ĵurojn,
Tiel mortigajn, kiel la glavoj de batalo
Eble jen niaj aŭdacaj militistoj
Levis supren nian liberecan standardon.
Ho, alta kaj nekonata klifo
Sur la praa kresto de Changbai,
Kies multjaraj branĉantaj radikoj
Estas kun la radikoj de mia koro kunplektitaj!
Mi sekvas la malnovajn batalajn spurojn
Kolektante miajn pensojn dum mi iras,
Kvankam certe estas malindaj ili
Antaŭ la herooj, kiuj ĉi tie batalis.
Tamen mi deziras, samcivitanoj, gefratoj,
Kvankam malcertas kaj malfortas mia voĉo,
Per mia koro kaj mia animo kanti
Pri la heroaj faroj de niaj homoj.

La densa arbaro ĉirkaŭ la monto estis tie, kie Kim Il-sung organizis kaj gvidis la reziston kontraŭ la armita okupado fare de Japanio.

2. "Ĉiela Lago" estas la nomo de la vulkana kraterlago en la kaldero supre de Monto Pektu.

3. Tumen rivero difinas parton de la limo de Ĉinio, Koreio kaj Rusio, leviĝanta sur la deklivoj de Monto Pektu kaj enfluanta en la Japanan Maron.

4. Ri estas mezurunuo de longo uzata en Koreio. 3.000 ri proksimume egalrilatas al 1.200 km, la prosimuma longituda interspaco de la korea duoninsulo.

Iom da filozofio

Pureco - virto de anto, ne de ato

José Mauro Progiante

Estas io, en la homo, kio ebligas, ke li agu. Ne gravas la nomo de tio, ĉu animo, konscienco aŭ spirito. Kaj ĉar la homo agas senĉese, per siaj pensoj, vortoj, korpaj movoj aŭ eĉ nur per sia spirado, la homo estas esence aganto.

La virtoj kaj la malvirtoj manifestiĝas dum la konscia agado, tiel, ke oni rekonas kaj la virtulojn kaj la malvirtulojn precipe per iliaj sintenoj, ne per iliaj faroj, kaj ankoraŭ malpli per la rezultoj de iliaj agoj.

Kiam bone trejnita hundo savas viktimon de katastrofo, oni laŭdas tion, sed tio ne signifas, ke oni atribuas al ĝi kuraĝon. Simile okazas, se homo per pure refleksa movo savas iun.

Inter ĉiuj virtoj, tiu, kiu plej evidente montriĝas kuŝanta en la profundo de

la homo, estas la pureco. Ĝi estas en la okuloj de la rigardanto, ne en la rigardato. Nenio estas pura aŭ malpura per si mem.

Estas grava eraro serĉi purecon ekster si aŭ voli, ke eksteraĵo estu pura.

Ekster la intimeco de la homo, la pureco ne ĉiam estas dezirinda. La akvo taŭga por trinkado estas malpura, tio estas, ĝi enhavas miksaĵon el mineraloj. En la naturo, ĉio vivanta miksiĝas, do malpuriĝas, kaj ordinare la purigaĵoj estas mortigaj. Senmiksa esto ne estas homa afero.

En la senco de virto, la pureco estas maniero ne vidi la malbonon, kie ĝi ja ne estas. La malpurulo vidas ĉie kaj plezure la malbonon.

Kiam temas pri la amo, la pureco ĉeestas se malĉeestas intereso, se la amato povas montri sian


malfortecon, sen ke la alia profitu tion por pruvi sian forton.

Oni kutime asocias purecon kun ĉasteco, ne atentante, ke la pureco povas manifestiĝi en iu ajn sfero de la homa agado. Iu artisto, iu revoluciulo aŭ iu sciencisto, ekzemple, povas esti puraj, se ili tute sin donas al nobla celo, volante nek monon, nek gloron. Kaj certe multaj puruloj troviĝas en Esperantujo.

Ĉar la egoo estas nature avida, ĝi devas kvietiĝi, por ke la pureco ĝermu.

Pureco kaj posedo estas antipodaj, ilia kunekzistado ne eblas. Tio klarigas, kial estas pli facile ami amikojn kaj filojn. De ili ni ne atendas multon aŭ eĉ atendas neniom.

Tiu, kiu volas rikolti purecon, devas semi en sian propran koron. ■



Iom da poezio



Se eu pudesse...

Alberto Caetano

Se eu pudesse trincar a terra toda
E sentir-lhe um paladar,
Seria mais feliz um momento...
Mas eu nem sempre quero ser feliz.
É preciso ser de vez em quando infeliz
Para se poder ser natural...

Nem tudo é dias de sol,
E a chuva, quando falta muito, pede-se.
Por isso tomo a infelicidade com a felicidade
Naturalmente, como quem não estranha
Que haja montanhas e planícies
E que haja rochedos e erva...

O que é preciso é ser-se natural e calmo
Na felicidade ou na infelicidade,
Sentir como quem olha,
Pensar como quem anda,
E quando se vai morrer,
lembrar-se de que o dia morre,
E que o poente é belo
e é bela a noite que fica...
Assim é e assim seja....

Se mi povus...

Alberto Caetano

Se mi povus tranĉi la tutan teron
Kaj senti el ĝi ian guston,
Mi estus pli feliĉa dum momento...
Sed mi ne ĉiam volas esti feliĉa.
Necesas foje esti malfeliĉa
Por ke oni povu esti natura...

Ne ĉio estas sunaj tagoj,
Kaj pluvon, kiam ĝi tro mankas, oni petas.
Tial mi prenas malfeliĉon same kiel feliĉon,
Nature, kiel homo, al kiu ne estas strange,
Ke ekzistas montaroj kaj ebenaĵoj,
Kaj ke ekzistas rokoj kaj herbo...

Necesas esti natura kaj trankvila
En feliĉo kaj en malfeliĉo,
Senti kiel rigardanto,
Pensi kiel piediranto,
Kaj kiam oni estas mortonta,
rememori, ke tagoj mortas,
Kaj ke la sunsubiro estas bela,
kaj bela estas la nokto, kiu restas...
Tiel estas, kaj tiel estu...

Grava novaĵo en la agado de EASP: Legoklubo Gilbert Ledon

LA REDAKTANTO

En la komenco de aprilo 2021 komenciĝis nova agado de EASP, kiu meritas registron. Temas pri virtuala Legoklubo Gilbert Ledon. Laŭ iniciato de nia vigla kunlaborantino Anna Lobo de Carvalho, el la urbo Poços de Caldas (MG), Carlos Andrade (konata en la Esperanta medio kiel Karlo Batalanto), el la urbo Curitiba (PR) kaj Paulo S. Viana (vicprezidanto de EASP), komenciĝis la kunsidoj per google.meet. La kunsidoj okazas dufoje en ĉiu monato, ĉiam en la unua kaj tria jaŭdoj, ĉiam je la 19-a horo. Partopreno estas malfermita al ĉiuj, kaj por tio sufiĉas kontakti analightworker@gmail.com. La ligilo por ĉiu kunsido estas montrata ĉiam per Vacapo, en la grupo de la legoklubo.

La kunsidoj celas, ke la tuta grupo prikomentu legaĵon anticipe faritan de ĉiu partoprenanto. Nuntempe oni legas rakontojn publikigitajn en la retejo Originala Literaturo Esperanta, de la konata verkisto Sten

Johansson. Estontece, oni planas legi tutajn librojn, poemojn kaj eseojn. Ĉiu kunsido daŭras proksimume unu horon, dum kiu oni analizas la enhavon mem de la legita teksto, ĝiajn stilajn aspektojn, kaj eventuale gramatikajn dubojn trovitajn en ĝi. Se al vi plaĉas altnivela literaturo en Esperanto, vi estas invitata. Bonvenon al nia Legoklubo Gilbert Ledon! ■



Instituto Butantan: pli ol vakcina produktejo

ALEKSANDRO PRADO

Instituto Butantan estas internacie rekonata institucio pri imunobiologia produktado de vakcinoj, serumoj kaj kelkaj medikamentoj. Tamen, ĉu vi konas la amplekson de aktivado de tiu instituto? La institucio liveras al la brazila ŝtato vakcinojn kontraŭ gripo, hepatito, difterio, tetanoso kaj aliaj. Esence, ĝi liveras tion al Brazilo, sed ne nur.

Tiu biologia esplorcetro disvolvas esplorojn rilate al la publika sano kaj kunlaboras por la pliboniĝo de la monda sano kaj partenerace agas kun internaciaj fakultatoj kaj institucioj. Kiel ekzemple: NIH (National Institutes of Health), tiu instituto kune kun Butantan prilaboras vakcinon kontraŭ la denga viruso, ja ĝiaj studoj jam bone progresis. Aldone al tio, Butantan estis elektita por, kune kun aliaj splorcetroj, gastigi studojn por produkti kaj provizi vakcinon kontraŭ la kokina gripo kaŭzita de la H7N9-viruso. Sciencistoj kaj la Monda San-Organizo opinias ke eble okazos nova epidemio aŭ eĉ pandemio fare de tiu ĉi viruso. Feliĉe, la elserĉoj pri la vakcino bone progresas kaj disvolviĝas. Instituto Butantan disponas kaj konservas zoologiajn sciencajn

kolektojn kaj disvolvas edukajn kaj kulturajn agadojn per kvar muzeoj: Biologia Muzeo, Historia Muzeo, Mikrobiologia Muzeo kaj la Publika San-Muzeo Emílio Ribas; krome disponeblas al studentoj staĝoj je la nivelo de scienca iniciato. Estas faka programo pri sano kaj postdiplomigo (magistriĝo kaj doktoriĝo). Per Butantan eblas diplomigi pri scienco de la toksinoj kaj, lastatempe, pri san-administrado. Ĝi ankaŭ proponas eksterajn fakultatajn kursojn por trejnado de profesiuloj, kiuj povas esti multobligantoj de informoj pri publika sano kaj mallongajn kursojn pri venenaj bestoj, insektoj de medicina graveco, serumoj kaj vakcinoj por la komunumo ĝenerale, studentoj, instruistoj, militistoj, fajrobrigadistoj, kamparanoj, inter aliaj.

Disvastigi sciencon estas unu el la celoj de tiu centjara instituto; per malmultekosta bileto ĉiu povas viziti la muzeojn lokitajn tie, tamen certe post la pandemio, ĉu ne? Interese, Instituto Butantan estis fondita en farmo nomata Butantan, kiam Brazilo suferis pro epidemio de bubona pesto en 1901. Tiam la instituto estis simpla laboratorio kreita kun la celo produkti serumojn

kontraŭ la nigra pesto. Ekde tiam, ĝi multe disvolviĝis kaj nuntempe ĝi helpas denove la popolon, kvankam la instituto ĉiam apogis la sanon de la popolo, sed ne ĉiuj perceptis tion. Konklude, scienco en Brazilo bone

disvolviĝas, tamen estas grave investi en ĝi, ĉar kapablon nia lando havas. Grave estas ankaŭ rekonstrui kiom da kontribuoj por la homa vivo troviĝas en sciencaj esplorcentroj. ■



La rakonto pri iu fonto

ELENA POPOVA

Dobriĉ, Bulgario

Vojaĝante, mi vidis fonton kaj benkon apud ĝi. Estinginte mian soifon per la fluanta freŝa akvo, mi sidiĝis por ripozi. La akvo kantis kaj parolis:

"Trinku, filino, kaj memoru bone viajn gepatrojn! Ili donis al vi vivon, instruís vin koni la mondon, distingi bonon de malbono kaj doni ĝin al la homoj. Aŭskultu, kion mi rakontos al vi.

Vivis patrino en nia vilaĝo, laborema kaj zorgema, kiel ĉiuj patrinoj en la mondo. Ŝi edukis infanojn kaj ili iĝis bonaj homoj. La tempo pasis, la infanoj forflugis de la patro-nesto, la patrino restis sola, ŝi maljuniĝis, sed ŝi ne plendis. Ŝi amis sian vilaĝon, laboris en sia ĝardeno, iom kreskigis florojn kaj legomojn, prizorgis la arbojn, akvumis ilin per mia pura kaj freŝa akvo. Kaj ili kreskis kaj donis al ŝi fruktojn ...

Sed la jaroj pasis kaj ŝi ne plu povis prizorgi sian ĝardenon. Tiam ŝia filo prenis ŝin al sia domo en la najbara vilaĝo, sed la patrino malĝojis. Ŝi ofte diris al li: "Memoru, filo, la plej bona loko estas la naskiĝloko, la plej dolĉa estas la akvo tie kaj la plej bongusta la pano! Kien ajn vi iras, kiom ajn ĝi estas bela, ne forgesu ilin! "

Kiam lia patrino iris al la steloj, li decidis feliĉigi sian patrinon,

konstruante ĉi tiun fonton je ŝia memoro.

Mi, la Akvo, nun ne nur estin gas la soifon de la vojaĝantoj, sed mi rakontas ankaŭ pri la amo de la Patrino al ŝia filo, pri lia amo kaj dankemo, pri la respekto, kiun li donis al ŝi per mi. Per mi, ĉiuj, kiuj trinkas akvon ie, ekscias pri ĉi tiu fila amo.

Kaj ke tiu, kiu trinkas, memoru sian patrujon, siajn gepatrojn kaj siavice, kiel ĉi tiu filo, faru Bonon por ili, por si mem, por la pasaĝeroj, kiel vi! Bonŝancon, mi deziras al ĉiuj, kiuj haltas ĉe mi! "

Mi aŭskultis la rakonton de la akvo, ripozis bone kaj daŭrigis mian vojon kun penso pri la Bono, kiun mi ankaŭ povas fari. Kaj la unua estis konatigi vin kun la historio de ĉi tiu bona laboro kaj deziri al vi:

Bonan vojon al la Bono, kiun vi povas fari hodiaŭ! ■



La rotaria klubo invitas

JOÃO OTÁVIO VEIGA RODRIGUES

otaviotutor@gmail.com

La Rotaria Esperanto-Klubo – Brazilo estas virtuala ejo por arigi amikajn kaj bonvolemajn homojn, kiuj deziras esti la ŝanĝo kiun oni volas vidi en la mondo. Uzante Esperanton en siaj kunvenoj kaj komunikoj, la klubo montras al la Rotaria komunumo la efikecon de nia internacia lingvo. Krom tio, la klubo serĉas rimedojn por ebligi komfortajn vivkondiĉojn al homoj. Ĝi havas projektojn en Brazilo, en Ugando, en Tanzanio. En Brazilo, la klubo subtenas per manĝaĵoj la komunumon, kiu suferas maldungadon pro la pandemio. Ĝi ankaŭ apogas la disvastigadon de la

sporto "Ĉukpilko", la paca sporto. En Ugando kaj en Tanzanio la projektoj celas planti fruktajn arbojn en la lernejoj, por instrui ekologion kaj ankaŭ batali kontraŭ la malsato. La Rotaria Esperanto-Klubo – Brazilo estas malferma pordo al nia agema Esperanta komunumo! Venu helpi la mondon per Rotaria klubo! La kotizo estas tre malalta, nur R\$ 350,00 en ĉiu duonjaro! Ni atendas vin!!! ■

Ĉu defio por la legantaro?

PAULO P. NASCENTES

**Emerita profesoro pri Beletro (UnB), verkisto, poeto,
teksto-reviziisto, terapeŭto.**

Poezio - kio estas tio?

Rekta demando: nu, kio estas poezio? Certe malfacilas respondi. Ĉu propravole vi kutimas legi poeziaĵojn? Se ne, kial ne? Plejparto de legantoj ŝajnas forfuĝi el poezio ĉu pro timo, malkono, mistrejnadado, malkomforto antaŭ tiu simbola lingvaĵo kaj aŭdaca diskurso. Pruvas tion la lokigo de poeziaj libroj preskaŭ ĉiam ĉe lastaj duonkaŝitaj bretoj en bibliotekoj kaj librovendejoj. Krom tio abundas nekonataj poetoj, kiuj bezonas debuti per partopreno en antologioj, malpli kosta maniero finfine atingi la publikigon de unua poemlibro. Ĉu estas sufiĉe multaj trejnitaj legantoj de poezio? Ĉu la pripoezia lingvaĵo estas sufiĉe konata, ĉu aktuala? Kio igas poezia skriban kompozicion? Ĉu elementaj kaj mezaj lernejoj devas

respondeci pri la inicado de legantoj de poezio? Ĉu por nia moderna kaj produktiva vivostilo ja poezio necesas?

Zorgema legado, gvidita babilado pri divers-stilaj poeziaĵoj certe kontribuas al la necesa edukado de sentemo, formado de legantoj, kapableco percepti nuancojn de beleco en ĉiutagaj spertoj, ĝuado de belaj lingvaj esprimoj, poeziaj imagoj, metaforoj, riĉaj dirmanieroj, kio ankaŭ iel pliblonigas la tekstoproduktadon, eĉ se oni ne emas verki poemojn. Imagu la ĝojon de lernejanoj malkovrinte diferencojn inter la tipa sinteno de ravita, romantika poeto kaj tiu alia de moderna, moka poeto. Kolekton da malsamaj kaj specifaj dirmanieroj ili certe rimarkos inter la lingvaĵo de la fama “Kanto de l’ ekzilo” Gonçalves Dias¹, kaj tiu de la poemo de Ferreira

¹ “Canção do exílio” (Gonçalves Dias): “Minha terra tem palmeiras,/ Onde canta o Sabiá;/ As aves que aqui gorjeiam,/ Não gorjeiam como lá.// Nosso céu tem mais estrelas,/ Nossas várzeas têm mais flores,/ Nossos bosques têm mais vida,/ Nossa vida mais amores./ Em cismar, sozinho, à noite,/ Mais prazer encontro eu lá;/ Minha terra tem palmeiras,/ Onde canta o Sabiá. (...)”

“Mia tero havas palmojn,/ Kie kantas l’ sabia’;/ La birdoj, kiuj ĉi tie pepas,/ Ne simile pepas tie.// Nia ĉiel’ havas pli da steloj,/ Niaj ebenaĵoj, pli da floroj,/ Niaj boskoj, pli da vivo,/ Nia vivo, pli da amoj./ Meditege, sole, nokte,/ Pli da ĝoj’ trovas mi tie;/ Mia tero havas palmojn,/ Kie kantas l’ sabia’. (...)”

La prezo de l’ fazeol’/ ne taŭgas en la poem’./ La prezo/ de la riz’/ ne taŭgas en la poem’./ Ne taŭgas en la poem’ la gas’/ la lum’ la telefon’/ la ŝtelkaŝado/ de lakto/ de viando/ de sukero de pano.// La publika funkciulo/ ne taŭgas en la poem’/ kun sia salajr’ de matsat’/ sia vivo fermata/ en arkivoj./ Same ne taŭgas en la poem’/ la laboristo/ kiu smirgas sian ŝtal-tagon/ kaj karbon/ en malhelaj laborejoj/ – ĉar la poemo, sinjoroj,/ estas fermata: “ne estas vako!”/ Nur taŭgas en la poem’/ la homo sen stomako/ la virin’ de nuboj/ la frukto sen prezo// La poem’, sinjoroj,/ ne malbonodoras/ nek flaras..

Gullar “Ne estas vakoj”²:

Kiu lernejano, kvazaŭ esploristo, lasus percepti kelkajn apartajn lingvajn trajtojn de ĉiu poeto laŭ malsamaj perceptoj pri la vivo, pri la funkcio de poezio kaj de arto mem? Per instigaj demandoj instruistoj povas atentigi ilin, ekzemple, pri ia naiveco rilate la ĝuadon de naturo. Male, la dua ŝajnas uzi signojn, kiuj koncernas ne al izolitaj objektoj kaj homaj aferoj, sed ilin metas en socian, historian kuntekston. En “Kanto de l’ ekzilo” la substantivoj ŝajnas abstrakte uzataj, kiaj palmoj, pepanta sabiao, steloj, ebenaĵoj, floroj, boskoj, kvazaŭ ĝeneralajoj. Male, la manko de laborvakoj estas konkreta, socia problema fenomeno: rizo kaj fazeolo havas prezon, same kiel estas ŝtataj aŭ privataj servoj gaso, lumo, telefono. Estas misagoj kaŭzantaj la malaperon de necesaj varoj, laboristoj estas kondamnitaj al malaltaj, nedignaj salajroj. La kritika perspektivo de la dua poemo venigas al la legantoj teruran konkludon: La poem’, sinjoroj,/ ne malbonodoras/ nek flaras. Jen kio okazas almenaŭ flanke de fikomercistoj, ruzuloj en registaraj postenoj, friponoj tiaspecaj.

Poezio, porleganta defio

Eblas konstati, ke la legado de poemoj postulas dozon da interpretpovo, kio ne venas spontanee se ne okazos specifa instruado tiucele. Okuloj kaj oreloj bezonas trejniĝi tiudirekte per kompetenta flegado. Kiam aŭtoro direktas sian atenton kaj fokuson sur specialajn lingvo-aranĵojn de la mesaĝo, la diskurso iĝas pli simbola, metafora, plena je kreivaj imagoj kaj lingvaj figuroj, plena je alloga ritmo, sendepende de tio, ĉu ni legas poemon, teatraĵon, rakonton, novelon, romanon.

Grava trajto de la poeziverkado estas, ke ĝi postulas atenton almenaŭ al du flankoj, nome speciala rigardo al realo kaj speciala laboro sur la lingvaĵo. Kial? Ĉar poeziaj signoj devenas el la sama vortostoko de la ĝenerala, ordinara lingvo. Nu, koro, ekzemple, estas termino de fakuloj pri biologio, medicino, korpekzercoj kaj samtempe ĝi estas poezia signo por aktoroj, poetoj, aliaj beletristoj. Tiujn du trajtojn de la poezia diskurso, nome la perspektivo pri realo kaj lingvaĵo, troviĝas en la poemo “Poeta/Poeto”. Pli precize ĝi troviĝas en nia dulingva pripoezia blogo: PAPOS NASCENTES: POETA/ POETO³.

2 “Não há vagas” (Ferreira Gullar): O preço do feijão/ não cabe no poema. O preço/ do arroz/ não cabe no poema./ Não cabem no poema o gás/ a luz o telefone/ a sonegação/ do leite/ da carne/ do açúcar do pão./ O funcionário público/ não cabe no poema/ com seu salário de fome/ sua vida fechada/ em arquivos./ Como não cabe no poema/ o operário/ que esmerila seu dia de aço/ e carvão/ nas oficinas escuras/ – porque o poema, senhores,/ está fechado: “não há vagas”/ Só cabe no poema/ o homem sem estômago/ a mulher de nuvens/ a fruta sem preço// O poema, senhores,/ não fede/ nem cheira.

3 POETA

teu olhar descabelado/ verticaliza horizontes/ marinhos/ sem que as naus despenquem// tua linguagem/ desmiolada/ subverte ocasos/cálidos/ sem que o caos se instale/ astros se desabem// teu ser descompasso/ abre-se em espaços/ únicos/ sem que o tempo vário/ deixe de ser vário/ e uno!
<https://www.paposnascntes.com/2012/09/poeta.html>

POETO

via nekombita rigardo/
vertikaligas horizontojn/ marajn/ sen
faligi ŝipojn//
via ventokapa lingvaĵo/
reversas sunsubirojn/ varmajn/ sen
kaoso-instaŭro/ astrokolapsado//
via esto sentakta/
malfermas en spacoj/ nuraj/
sen tempo diversa/ ĉesu esti diversa/
unuoj!

Poetiko tradicia, poetiko libera, konkludo

Eblas konjekti, ĉu ne povas okazi bela soneto, kun versoj zorgeme verkitaj, fortaj silaboj regule distribuitaj, rigida skemo de rimoj, kolekto da vortoj malofte uzataj ĉiutage kaj malgraŭ tio ĝi estu senpoezia teksto. Ĉu male ne povas ankaŭ okazi poezie riĉenhava verko sen regulaj versoj, sen regulaj rimoj kaj ritmoj, tamen plena je, mi diru, poezieco kapabla vekti en la legantaro ian estetikan senton, delikatan kaj kortuŝan efikon sur la spirito antaŭ nedirebla beleco? Kelkaj legantoj, kiuj ŝatas legi poeziaĵojn, certe preferos legi soneton (aŭ alian poemon de fiksita formo) de klasikuloj, interalie Gregório de Matos, Gonçalves Dias, Castro Alves, Casemiro de Abreu, Raimundo Correia, Olavo Bilac, Cruz e Souza. Senprobleme. En ordo. Aliaj preferos legi modernajn kaj post-modernajn poetojn, kiajn Oswald de Andrade, Cecília Meireles, Manuel Bandeira, Carlos Drummond de

Andrade, Haroldo kaj Augusto de Campos, Décio Pignatari, Manoel de Barros. Senprobleme. Ĉio estas en ordo.

Se estas aŭ ne konsento pri tio, se oni ricevis aŭ ne lernejan instruon kaj trejnadon de perceptokapablo pri tiu tipa diskurso, tio ne gravas, ĉio estas en ordo. Verŝajne, laŭ nunaj esploroj, tio ne dependas de hazarda talento trovata en kelkaj homoj, sed neata al aliaj malpli benataj. La bona notico estas, ke se temas pri kapablo perfekte trejnebla, tiu lernado povas komenciĝi tuj. Sufiĉas vera motivigo, dispozicio, trejnado. Sufiĉas decidi enmeti en la liston de viaj legoprioritatoj verkojn de bonaj poetoj. Se necese, eblas starigi legoklubon, kontakti kaj kontrakti fakulon. Se tamen ne estas tiu eblo en via vivo pro diversaj cirkonstancoj, tio tute ne gravas, ĉio estas en ordo. Daŭras tamen sur la spirito de multaj homoj la demando: ĉu por nia moderna kaj produktiva vivostilo poezio necesas? ■

Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

Demando:

Kiu estas la ĝusta prepozicio uzenda en la jenaj frazo?

La ĉielo estas kovrita per/ de nuboj.

La kampo estis balaita per/ de vento.

La urbo estis inundita per/ de pluvego.

Amaso da homoj estis mortigitaj per/ de la viruso.

Respondo

En ĉiuj ĵus cititaj ekzemploj oni uzu la prepozicion **de**. La kialon Zamenhof jam klarigis antaŭ pli ol 110 jaroj:

La prepozicion “per” post pasivo ni povas uzi nur en tia okazo, se ĝi troviĝas antaŭ vorto, kiu esprimas ne la aganton mem, sed rimedon, uzitan de iu alia aganto; ekzemple: “la letero estas skribita per blua inko” (ne “blua inko skribis la leteron”, sed “iu persono skribis la leteron, uzante por tio bluan inkon kiel rimedon”); sed la esprimo “la tero estas kovrita per neĝo” ne estas bona, ĉar ĉi tie ne iu kovris la teron per neĝo, sed la neĝo mem kovris la teron; sekve la neĝo mem estas la aginto, kaj ĝi devas havi antaŭ si la prepozicion “de”. La prepozicio “de” post pasivo ĉiam montras, ke se ni aliformigus la pasivan frazon en aktivan, la vorto, kiu havas antaŭ

si la diritan prepozicion, fariĝus subjekto de la frazo. (Respondo 41 b, La Revuo, Majo de 1908)

La klarigo de PMEG similas tiun de Zamenhof: En **pasivaj frazoj** oni povas iafoje heziti, ĉu uzi “per” aŭ “**de**”. Tiaj hezitoj ekestas ĉe verboj, kiuj povas havi aŭ aganton aŭ ilon kiel subjekton. Oni povas diri ekz. “la botelo estis ŝtopita **per korko**”, se oni pensas: “Tu ŝtopis ĝin **per korko**”. Sed oni ankaŭ povas diri: “la botelo estis ŝtopita de **korko**” se oni pensas: “Korko ŝtopis la botelon”. Aliaj tiaj verboj estas ekz. “kovri”, “bari”, “garni”, “ilustri”, “komenci”, “trafi”, “vundi” kaj “legitimi”.

Do iafoje oni povas egale bone uzi ambaŭ prepoziciojn, tamen kun malsamaj signifoj:

*El la tero disbatita **per** la piedoj fariĝis marĉo, [...] BV (Iu disbatis la teron **per** siaj piedoj. Tamen ankaŭ eblus disbatita **de** la piedoj, kaj ĉi-okaze la piedoj mem disbatis la teron.)*

*[...] sed se ni eĉ supozus, ke la kongreso [...] estos tiel blindigita **per** la rutinaj kutimoj, ke ĝi tamen faros tian absurdan elekton, [...] EE (Ja eblus uzi **de**, esprimante, ke la kutimoj mem blindigas la kongreson.)*

*[...] por ke plenumiĝu la vorto de la Eternulo, dirita **per** Jeremia: [...] MT (La prepozicio **per** estas tute en ordo, ĉar Jeremia estas la ilo, **per** kiu la Eternulo diris la vorton. Se oni uzus **de**, tio signifus, ke Jeremia mem diris la vorton.)*

Jen dubinda ekzemplo, ĉerpita el la Fundamento: *La tuta supraĵo de la lago estis kovrita per naĝantaj folioj kaj diversaj aliaj kreskaĵoj.* EKZ §35 (Sajne **de** estus pli taŭga, ĉar la folioj kaj kreskaĵoj mem kovris la lagon. Supozeble Zamenhof pensis pri la vento aŭ la naturo, kiu kovris la lagon per folioj kaj kreskaĵoj; sed tiu ĉi rezono aspektas al mi iom Prokusta.)

Kaj jen unu frua ekzemplo, el 1893, en kiu Zamenhof malĝuste uzis **per**: *Sed baldaŭ ŝiaj vestoj, penetritaj / Per peza akvo ŝin malsupren tiris, / La malfeliĉan, al terura morto.* HAM (La anglalingva teksto de Ŝekspiro klare esprimas, ke la akvo mem penetris ŝiajn vestojn, sed ne ke iu aŭ io penetris ŝiajn vestojn per akvo. Do la ĝusta formo devus esti: *Sed baldaŭ ŝiaj vestoj, penetritaj de peza akvo [...]*)

Mallongigoj: BV: La Batalo de l' Vivo; EE: Ekzercaro de la Fundamento de Esperanto; EKZ: Ekzercaro de la Fundamento de Esperanto; HAM: Hamleto; MT: Malnova Testamento; PMEG: Plena Manlibro de Esperanta.

de ~o. tro~a. Konscio pri si
respektiv²a. Montranta
la preparolataj objektoj, dum
as al ĉiu el la ceteraj preparol
ĉiu: la ~a sinteno de ĉiu el la
librojn en ilian ~an lokon; la
oj de ĉiu kandidato decidas pr
maniero: en triangulo ĉiu el la
respondas ~e al ĉiu el la lateroj d
B al b, C al c). RM. Oni ne uzu ti
simpla senco de aŭ.
★**respond**/l 1 (tr) Demandite,
nenion por ~i²; mi havos, kion ~i d
anto^x; li ne ~is eĉ unu vorton; li ~is, (abs
as: «estus tre bele». ~is la filino²; (abs
as, sed mi ne ~os^x; la reĝo ~is al la po
afable^x; li ~is nur per insultoj. → rajt
Reciproki per diro aŭ skribo: la redaktejo se
mi tiujn demandojn, k mi ~os ilin en La Revu
ricevis vian leteron [...], kiun mi ne povis tuj
amaso da ne ~itaj leteroj²; unuj ~as tiu
demandon per absoluta «jes»²; (analoge) ~i
(al) Esti proporcie, simetrie akordita kun: la 1a de
lanuaro de la malnova rusa kalendaro ~as al la 14a
la nova; via desegno ne ~as al la bezonoj de la
no²; la flankoj de la palaco bone ~as al la kuraĝo^B; homo
B: la fortoj ne ĉiam ~as al la karaĝo^B; ke ĝi
oj multe ~as al liaj personaj konvinkoj.
~as por la konvinkoj nek agoj de li²; ĉiu alia
tiu aŭ alia E-isto ligas kun la E-ismo estas
ure privata, por kiu la E-ismo ne ~as; la
ri la subuloj^B; la gazeto ne ~as pri la
reklamoj. ~o. Ago k vortoj de tiu, kiu
a demando, tia ~o²; kian ~on donis la
sia sinjoro?²; ĉu vi donis al li jesan ~on
vaj (R)~oj de Z.; (f) pri tio ĉi la
perfekte trankvilligan ~on². ~a 1
on mia ~a letero mi diris, ke [...].
rcian konformecon: ago ~a por
estas la plej ~a por edziĝo²;

Mikrorakontoj: nova literatura ĝenro?

PAŬLO SERGIO VIANA

Unu el la plej karakterizaj inklinoj de la homo estas... rakontado. Ĝi estas parto de la homa historio. Oni preskaŭ rajtas diri, ke homoj ne vivas sen rakontado, ĉu pri veraj, ĉu pri fikciaj aferoj. Ŝajne, la perparola transdonado de spertoj al aliaj kunhomoj havas ian mensan funkcion. Ĉu ĝi helpas la ekvilibron de la mensa sano de la rakontanto? Ĉu ĝi helpas la rakontantojn, eĉ kiam temas pri fantaziaj rakontoj? Ĉu ankaŭ aŭskultantoj ricevas helpon por elteni la krudecon de la vivo en nia mondo? Fakto estas, ke dum jarmiloj la homoj rakontis siajn kaj aliulajn spertojn, en obseda ofteco: homoj ne vivas sen rakontado. Rakontado fariĝis arto, arto per vortoj. Ĝi komenciĝis kune kun lingvoj. Ĝi evoluis de ŝtonaj desegnaĵoj faritaj de primitivuloj kaj atingis eminentecon en romanoj, noveloj, rakontoj. Dum la lastaj jardekoj, nova literatura ĝenro firmiĝis en la tuta mondo, ene de iaspeca minimumisma movado. Temas pri la arto rakonti tutan historion per kiel eble plej malmultaj vortoj. La afero nuntempe furoras. La kriterio varias de nur kelkaj vortoj ĝis duonpaĝo. La defio estas uzi fantazion de la legantoj, kiuj mem kompletigas la “nediritan” laŭ sia gusto. En tiu senco, ĝi iom similas

poezion.

Sed mikrorakontoj (aŭ mikronoveloj) tute ne estas simplaj anekdotoj - kvankam ili povas ja esti humuraj. Ilia sekreto kuŝas en la surprizo, ĉe la fino de la teksto, kiu aldoniĝas al neordinaraj situacioj, tiel ke post la lasta vorto leganto sin demandu: - Kion pensi pri tio? Mikrorakontoj estas ĉiam provokaj kaj malbanalaj. La afero tiel multe disvastiĝis, ke la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio decidis inkluzivi ĉi tiun novan ĝenron inter siajn premiobranĉojn. Kaj ŝajne la publiko varme akceptis la ideon. Dum la lastaj konkursoj, amaseto da aŭtoroj provis sur tiu kampo. Kaj la rezulto estas tiel bona, ke la organizantoj konsideras la eblecon atribui pli da premioj en ĉi tiu branĉo (ĝis nun oni estigis nur unu premion al mikrorakonto en ĉiu konkurso). Kaj plie. La organizantoj, bedaŭrante, ke multaj nepremiitaj verkoj, sendube valoraj, neniam atingus la publikon, decidis aperigi libroforme antologion. Publikiĝis belega libro, kiu meritas nian entuziasman atenton: “Ĉiuj steloj etas nokte (Mikronoveloj kaj aliaj mikrorakontoj)”, eldonita de Mondial. La kovrilo estas arta kaj la enhavo, mirinda. Antaŭparolo de Miguel Fernández kaj eseo de Giulio

Cappa malfermas la volumeton. Sekvas premiitaj verkoj kaj aliaj, kiujn probable la publiko neniam havus la okazon legi, se ne per ĉi tiu libro. Kelkaj ŝajnas al mi majstraj, kiel “Homlupo” de Laure Patas d’ Illiers. Unu el la plej trafaj miaopinio, estas tiu de Francisco Javier Moleón. Jen ĝi:

Oron similas

“Ĉu tio estas ĉio?”, mi demandis.

La ĉerko restis silenta.

Recenzo 2

“La Eta Leono Lernas Aliajn Blekojn”



La libron kompletigas kolekto da mikrorakontoj de klasikaj Esperanto-aŭtoroj (kio montras, ke la afero ne estas tute nova), kaj kolekto da mikrorakontoj de la hispano Liven Dek (Miguel Gutiérrez Adúriz, la sekretario de la Belartaj Konkursoj). Laŭ mia juĝo, temas pri pura literaturo! Nepre leginda libro! ■

Aŭtoro: Lode Van de Valde
Ilustris: Anna Lobo de Carvalho
Eldonejo Libera, 2021

PAŬLO SERGIO VIANA

Infanliteraturo estas grava parto de la literatura panoramo, en ĉiu ajn lingvo. Kompreneble, ankaŭ en Esperanto. Verki por infanoj ŝajnas simpla afero, sed tute ne! Produkti vere valoran infanliteraturon estas io, kio postulas talenton, sentemon pri infana psiko, kaj delikatan lingvosenton, tiel ke la stilo estu samtempe taŭga por infanoj sed nepre ne banala aŭ kliŝa. Ankaŭ la temoj devas esti ĝuste elektitaj, por ke ili kaptu intereson de junaj mensoj. Oni evitu tro edifajn mielaĵojn, sed trovu amuzan, pensigan rakonton. Oni ne pozu kiel instruisto, sed oni provoku! Infanoj amas provokojn...

Ĉu la monda lingvoproblemo povus esti temo por bona infanlibro?

Jen la defio, kiun alfrontis la aŭtoro de ĉi tiu ĉarma “La eta leono lernas aliajn blekojn”. Li perfekte venkis la defion! La eta leono lerte uzis sian bestopoliglotecon por sin savi de malfavora situacio. Inter la linioj, oni sugestas krome, ke interesiĝo pri aliulaj kulturoj alportas amikecon, solidarecon kaj engaĝiĝon.

La ilustraĵoj estas same bonaj kiel la teksto mem, kaj ili perfekte kongruas. Desegnis nia samideanino (aktiva en la agadoj de Esperanto-

Asocio de San-Paŭlo) Anna Lobo de Carvalho.

Fine de la libreto troviĝas du tre interesaj aldonaĵoj. Unue, kolekto da bestobildetoj kun la verboj, kiuj respondas al ilia sonproduktado. Due, kolekto da proverboj, kiuj temas pri bestoj kaj ilia sonado, kaj oni proponas, ke legantoj interpretu tiujn proverbojn. Tre instiga ekzerco! “La eta leono...” estas perfekta ekzemplo de infanliteraturo. Inter ni, en Esperantujo, ĝi estas ankaŭ perfekte taŭga por komencantoj, kiuj serĉas amuzan, simplan kaj ĉarman legaĵon! ■

ANNA LOBO

RADIOAKTIVA

Originala nomo: Radioactive

Reĝisoro: Marjane Satrapi

Aktoroj: Rosamund Pike, Sam Riley,

Aneurin Barnard kaj Anya Taylor-Joy

Tipo: Dramo / Biografio

Lando: Britio

Lanĉo: 14.09.2019 (Festivalo de Toronto)

Tempodaŭro: 109 minutoj




Mi proponas al vi vojaĝon al Parizo de la 19-a jarcento. Komence de la Industria Revolucio. Tie troviĝis tre brila pola virino. Mi persone ege ŝatas kiam virino estas rekonata pro siaj kreaĵoj, ĉar tio povas helpi konsciigi ĉiujn pri la valoro de egaleco kaj pri tio, ke virinoj rajtas esti tie kie ili volas. Ŝi estis unu el la malmultaj virinoj kiuj elstariĝis en scienca kampo. Ŝia nomo? Marie Curie... Kaj jen ŝia historio.

De la komenco de la filmo, oni eniĝas en etoson de la tiuepoka Parizo- vestaĵoj, kaleŝoj, konstruaĵoj. Oni ankaŭ ekkonas tiun polan infaninon nomatan Maria Salomea Skłodowska, kiu jam en frua aĝo devis superi multajn malfacilajn travivaĵojn. Sed pli aĝe, kaj jam en universitato, farante siajn esplorojn pri Fiziko kaj Kemio, ŝi ekkonis francan scienciston Pierre Curie. La

rilato fariĝis edziĝo kaj tiam Maria ŝanĝis sian nomon al Marie Curie. Ili havis bonan rilaton en kiu unu forte apogis la alian kaj admiris la intelekton kaj konon de la alia. Kune, ili pristudis multajn ecojn de atomoj, kiel la radioaktiveco, kaj malkovris du novajn kemiajn elementojn - polonion kaj radiumon - brilajn kiel ŝi. Nun venas la demando: Ĉu bonaj aŭ malbonaj konsekvencoj venos el tiu malkovro? Ĉu la bonaj superos la malbonajn? Ĝis kiu limo vi pretas iri por pruvi iun ideon, intuicion aŭ ion kion vi kredas?

La filmo estas ege bela, kaj mi ja invitas vin ekkoni la historion de tiu polino, kiu estis brila je ĉiu senco kaj anticipis sian epokon - Marie Curie. Mi certas ke ŝi inspiras vin! La filmo troveblas ĉe Netflix! Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo. ■



Fondusoj de EASP

Se eblas al vi,
konsideru la eblecon
subteni la asocion
per mondonaco.

Konatiĝu kun niaj fondusoj:

easp.org.br/asocio/doacoes

